



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS**

**Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16**

## LA AŬTUNO ALVENAS

Varmaj tagoj forpasas,  
jam alvenas aŭtun',  
belvetero nin lasas,  
nin forgesas la sun'.

Flustras vento malvarma  
pro natura la leg'  
ke la tagojn pli ĉarmajn  
sekvos frosto kaj neĝ'.

Kuras nuboj ŝafare,  
milde ploras ĉiel',  
flugas suden birdaro  
al la varmo kaj hel'.

Sed l'anim' de l' poeto  
ĉiam vivas en lum',  
flanke de l' multfaceta  
malafabla vivzum'.

Kaj tra vintraj neĝmaroj  
kun la frosta vual'  
la anim' gardostaros  
sur posten' de l' batal'.

DEŬTEREV.

Omutnisk (Rusuĵo).

## Historio de unu tago en tri leteroj el Jacinto Benavente

I

Ĝi estas por mi hontiga, sed vi devas min pardonu. Hodiaŭ mi ne povas iri al la konsiliĝo: la motivo estas pekiga. Guste de la kvina ĝis la sepa mi devas iri al Laŭro por tie provi kelkajn de mi menditajn vestojn. Vi ja scias kia ŝi estas; se mi preterlasas mian vicon, ŝi lasas min sen vestoj tiun ĉi vintron. Ĉu mi estas pardonata? Mia malkaŝemo bone meritas tion. Mi povis elpensi alian pretekston. Alian bonfaran konsiliĝon, iun kapdoloron, la dentosuferon... sed ne, mi forlasas min al plena kulpeco pri koketemo. Tiel vi povas diri ĝin al la amikinoj, certa ke ĉiuj min absolvos. Oni diris al mi, ke la Markizino estas agonianta.

Kompatinda Sinjorino! Hodiaŭ vespere mi vidos vin en la Reĝa Teatro. Ĝis poste.

II

Multe mi bedaŭras tiun ĉi malbonfaron, sed hodiaŭ estas al mi neeble iri al vi por provi miajn vestojn. Guste de la kvina ĝis la sepa kolektiĝas la Komitato de Sinjorinoj por la Honesteco kaj Laboro, kies Sekretariino mi estas, kaj mi ne povas ne alesti. Mi iros al vi morgaŭ frue. Ne prokrastu, je Dio, la vestojn, speciale la nigran, ĉar nia Prezidantino estas agonianta, kaj se ŝi mortas, mi ne scias, kiel mi povos iri al la funebraj ceremonioj.

III

De la kvina ĝis la sepa.

*El hispana lingvo tradukis,  
VICENTE INGLADA.*

**Duonpremita Artikolo el la 1.<sup>a</sup> Temo**

## «Hispana Vilago»

Jen vilago kiu trompas nin per la magio de l'arto. Tamen, ĝiaj mensogoj estas agrablaj. Se ni troviĝas meze, en la purblankeco de ĝiaj tordaj stratoj, antaŭ la flora ĉarmo de ĝiaj kradoj, tiam ni pensas ke ni estas en Andaluzio. La imponaj konstruaĵoj, simbolo de forta raso, rememoras al ni Navaron aŭ Vasklandon. Alie, kiam ni vidas la sobran malnovan arĥitekturon, ŝajnus al ni Majorko aŭ Valencio.

Ĝi havas el Avila la fortikajn muregojn, el Valderrobres la Urbestraran Domon, el Utebo la arabeskojn de la sonoril-turoj. La sobreco de iu fama Monaĥejo parolas pri Katalunujo.

Ĝi mensogas distancojn, ĉar kelkaj paŝoj niaj signifas tutan pilgrimon tra la hispanaj vilagoj. Tiel, jen ni estas en fruktodona Murcio, jen en malseka Galicio, kiel en persista Aragono. Jen en potenca Katalunujo, fine, en adstringa Kastiljo. Vilago kiu havas guston el legendoj kaj historioj. Sur ĝiaj pordoj oni montras la blazonajn ŝildojn, kaj en la vestibloj de ĝiaj domoj, la tipajn industriojn de la hispanaj regionoj.

“Hispana vilaĝo” trafa aro da arkitekturaj kaj sentimentaj karakteroj. Vi trompas la vizitanton per la magio de via artifiko. Vi mensogas maljunecon kaj vi estas juna. Viaj stratetoj malrektaj kaj viaj imponaj domegoj parolas pri la jarcentaj moroj de iu raso de nobeloj kaj kamparanoj, dum ili nur estas atestantoj de festoj kaj de la admiro de ĉiuj, kiuj vin vizitas. Mensogas, la sonorilo de via eta preĝejo vokante al la piaj praktikoj je la silenta horo de l’vespero, dum via templo estas fermita. Mensogas, ankaŭ, via Monaĥejo sen monaĥoj;; viaj malriĉaj dometoj sen malriĉaj familioj. Mensogas viaj muregoj pri pasintaj heroaj epizodoj, kaj via tuta enhavo estas nur mirinda fiktivaĵo.

Sed mi admiras vin, hispana vilaĝo, kaj en la paco de viaj stratkruciĝoj ŝtonaj kaj de viaj karakterizaj kvartaloj mi forgesas la bruegon kaj rapidemon de tiuj, kiuj vivas for.

PETRO MARQUETA.  
(En *Barcelona Ekspozicio*).

## Letero el Nederlando

Kara Redakcio.

Per ĉi tiu letero mi rakontas, kiel oni en iu parto de Nederlando ankoraŭ festas la Paskon.

Jam longe antaŭ la festtagoj la junuloj el la vilaĝo komencas kolekti bruleblajn objektojn, ekzemple, malgrandajn pinarbojn, malvivajn, kanon, pajlon k. t. p. Ĉion ili amasigas meze de la kampo kaj formas tiamaniere altan lignaron.

Je la vespero de la unua Pasko-tago ĝi devas servi por la Pasko-fajro. Je la Sankta Vendredo la lignaro devas esti preta. Dum la Pasko-tagoj vi trovas en ĉiu domo pinarbeton, ornamitan per multkoloraj paperoj. En la supraĵo vi vidas kvin cignetojn ĉirkaŭitajn per krono, kiuj estas baktitaj el panpasta. Ili rememorigas nin al la oferdonacoj de la idoloj el la pratempo. Tamen niaj kamparanoj ne scias pri tio. La tagmanĝo de tiu tago konsistas el rizo kun ovoĵoj. Unufojon jare la kamparanoj manĝas ovoĵojn, nome la unuan Pasktagon; sed tiam ili formangas multajn. Ekzistas personoj, kiuj formangas 20 ĝis 30 ovoĵojn, kaj tiun, kiu mangas la plej multajn, oni kronas, kiel reĝon de la ovmanĝantoj. Kiam vesperiĝas, la gejunularo kolektiĝas ĉe la lignaron en la kampo kaj, kiam estas tute mallume, unu el ili bruligas la altan turon. En la pratempo oni uzus fajrstonon kaj ŝtalon, sed nuntempe oni bruligas la lignaron per alumeto kaj tufo de pajlo. Post kelke da momentoj flamegoj bruas en la aero kaj ŝajnas, ke ili atingas la ĉielon. Kantante la popolkantojn, la gejunuloj dancas mano en mano, brako en brako ĉirkaŭ la grandega fajro. Ili dancas kaj kantas, ĝis kiam la lasta peceto forbrulas kaj la lasta fajrero estingiĝas.

Tiam ĉiu knabo prenas karbigintan lignaĵon kaj en la nun profunda mallumo li klopadas kapti knabinon por nigriĝi ŝian ruĝan vizaĝon. La kriaĵoj kaj ridantaj fraŭlinoj ekforkuras, sed, kompreneble, finfine ĉiu knabo kaptos knabinon kaj post kelke da tempo ĉiuj iras hejmen. Rigardante ĉirkaŭen, ĉie, en la malproksimeco ĝis la horizonto, ni vidas la flamojn de la bruliĝintaj Pasko-fajroj kaj image ni povas aŭdi la kantojn kaj la ridojn de la feliĉaj kaj gajaj gejunuloj.

Tiamaniere oni festas la Paskon en la postangulo de la Nederlanda Provinco Gelderland. Ĉu stranga? Jes, laŭ ni, modernaj homoj; sed pripensu, ke antaŭ 2000 jaroj la pragepatroj de ĉi tiuj simplaj kamparanoj festis sammaniere la saman feston kaj mi ĝojas ke la posteuloj ankoraŭ faras la samon, ĉar pro tio mi povas rakonti iom pri la kutimoj de miaj samlandanoj al miaj hispanaj geamikoj.

Kamaradece salutas via.

J. SLOTEGRAAF.

## LA SALTO DE ROLDÁN

La centra, altaragona montaro ŝajnas la murego de grandega urbo de gigantoj; de superhoma murzono. Tiu ĉi ŝtonmuro elstaranta antaŭ la furiozo kaj la krioj de la abismo inter bruego de rokoj, blekoj de torentoj kaj ektuŝoj de lavangoj havas sian grandan portalon; la “salto de Roldán”, portita kiel faminda entrepreno sur la armilsildon de la mezepoka Hosko, kiun ĝi havas malsupre. Malhumila ĝi rigardas la ebenaĵon, envolvante ĝin per sia penetrema okulo de viglisto ŝtoniĝinta. Ĝiaj pordoflankaj subteniloj estas du ruĝaj ambosoj de timiga, ciklopa forĝejo. Tra inter ili ektremas la saŭmanta, katenata torento, kiun postsignas la malutila kreskajaro. Supre ekmontriĝas la trememaj abioj pendantaj de la abruptaĵo; kaj poste, kiam ĝi atingas la ebenaĵon, la akvo disvastiĝas, kiel enpaca ekĝemo.

Tiuj elstaraj ŝtonegoj estas tiu de Sankta Mikaelo kaj tiu de Amán. Inter ambaŭ estas profunda fortranĉaĵo tiel granda, kiel tiu, kiu malfermis la glavo de Roldán en la pirinea breĉo. Tiu ĉi “Salto de Roldán” ĉu havas ian rilaton kun Roldán de la legendo pri Karlomagno? Eble rilatas al ĝi la mirendaĵo de tiu ĉi kolosa, homera salto, farita kun sia kurĉevalo Olimpa, forkurante de la vaskoj. La mezepoka fantazio plenigis per himeroj de la Karlomagna batalanto la teritorion de la antikva Vaskonujo kaj tiu ĉi lando al li apartenadis ĝis la malproksimecoj de la rivero Esera.

Aliaj diras, ke tiu ĉi Roldán estis riĉa viro, kiu ĵurprenis en Hosko, kiel reprezentanto de la unua nobelaro, al la reĝo Ramiro dua, kiam ĉi tiu estis proklamata reĝo de Aragono. Sed mi kredas, ke tiu ĉi distingindulo nur vivis en la menso de Cánovas del Castillo kaj en lia novelo “La Campana de Huesca” (La Sonorilo de Hosko) kaj estus plie, tre malgranda heroo por tia heroaĵo.

Oni povas sperti la plezuron rajdi sur unu el ambaŭ apogoj de la roko Sankta Mikaelo plilon-giganta la montaron Santolariatán, kiel ĝia kunlapogo estas la loko, kiu staras antaŭ la montaro Sankta Juliano.

Estas danĝera, kapturiga zigzago, tra kiu supreniras la aŭtomobilo. La ŝafidaroj supreniras la krutegajn montdeklivojn, forkurante timeme de la bruegoj de la spireganta motoro; la paŝtistoj kun la kruroj malkunigitaj kaj en la manoj la apogbastono, rigardas indiferente la supreniron de la veturilo. La vilaĝo Apiés restas malsupre kaj ĝia feŭda fortikajuro kaj la sonorilejo de ĝia preĝejo romstila estas, de ĉi tie, punktoj en la bruna makulo de la domaro. La abismo estas la kunulo de la vojaĝanto, ĝis kiam oni alvenas en la ebenaĵon.

Nun la ŝtonego Sankta Mikaelo estas malpligran-

da, sed eĉ tiele, ĝi aspektas sfinkson, la sulkoj de kies haŭto estas kvazaŭ nealireblaj ŝtupegoj. Ĉe la kurbo de la ŝoseo restis kaŝata la vilaĝeto Sankta Juliano de Banzo.

Estas dirite, ke ĉi tiu "Salto de Roldán" estas la pordo de la aragona montaro. Ekzakte: de ĉi tie oni ekvidas la tutan ebenajn ĝis Zaragozo; la Hoskan, vastan kavaĵon "La Sotonera", la montaron Alcubierre kaj la zaragozajn nebulojn de la rivero Ebro; tio estas, la terflavan, senfinan, panoramon, kie la vido glitas al senlimaj horizontoj. Kontraŭe, trans la alia flanko la amfiteatro katenanta la riveron Flumen haltigas la vidadon; ĝi estas la montara masivo tranĉata de la gorgo farinta la grandegan glaciejon Belsué, kie unue la akvoj restadas amasigitaj de la homa industrio. Ĉi tie estas la deponejo, kies akvo fluas tra la mullumega gorgo de Roldán por produktigi la riverbordajn terojn ĝis la limo mem de la stepo. La "rallas" viglas la fluejon kaj la grotoj forĵetas en la fluejon la saŭmaĵon de siaj faŭkoj. Iom pli supre "Cienfuens", cent fontoj de travidebla fluidaĵo, liveras la sangon plej estimindan de tiu ĉi arterio.

En la altaĵon de la roko estas enigataj fernajloj; grimpante per ili ni alvenas sur la supron kaj ĝin ni okupas. De ĉi tie oni kaŝobservas laŭ plezuro la perspektivojn de la senfino. La grandanimaj agloj vidas malŝatita sian solecon: la kulturoj etendas siajn flugilojn kaj takte desegnas rondojn super niaj kapoj kaj malsupreniras kvazaŭ niaj korpoj estus facila kaptajo.

Ĉe tiu ĉi altaĵo estas ruinoj de kapeleto. Miraklo de la mezepoka fervoro, kiu atingis starigi sur la altega loko spiritan bastionon de Aragono. Kelkaj ŝafinoj lasas postsignojn sur la ruboj. Ĉu ŝafinoj ĉi tie? Ne estas dubo.. Ĝi estas kampa hospitalo por la malsana bestaro. La paŝtistoj levas surŝultre la bestojn kripliĝintajn; ili lasas ilin tie, ne timante, ke ili forkuros, ili metas nur akvon por ili; ĉar nutraĵon ili havas spontanee, abundan kaj freŝan sub la brilo de la suno. De tempo al tempo supreniras la paŝtistoj al la placeto, por fari viziton, grimpante rapidege sur la rokenigitaj fernajloj, kiujn ni suprenrampis kun timema emocio, kaj poste ili disigas denove tra la montaro, kantetante la grand-sinjoran regadon potencantan la senkulturan lokon. Kaj, kiam la ŝafino resaniĝis ĉe tiu stranga resaniĝejo la paŝtisto ĝin mallevas ameme, por ke ĝi piedbruu tra la krutaj valetoj, tra la rokfendoj de tiu ĉi giganta bastiono.

Tiu ĉi kvazaŭ sojlo de la ĉielo, ĉar ĝi estas tre senhoma, prezentas grandan rifuzejon al atenta rigardado; kaj estas tiel grandioza ĝia serena naturo, ke la homo, vere estas ĉi tie superflua; ŝajnas, ke ĝi ĝenas la floran, la aromon kaj la lumradion. Tiu ĉi estas loko malpermesita al la malsaniga nebulo. Ĉi tien neniam alvenas la malfeliĉegoj de la ebenajo. Sed, kia kontrasto: kia terurega spektaklo tiu de la gorgo aliformigita en neĝoventejo, kiam la vento blekas kaj la nuboj estas jetataj galope; kiam la tondro atingas trioblan eĥon kaj la fulmo tranĉas la silueton de la koloso!

Altiras la abismo. Super la rivero la alteco estas nemezurebla: naŭdek, cent, ducent metroj... kiu scias!

Ŝajnas, ke fosis tiun ĉi fosajon la laboristoj de brakoj nudaj kaj fibraj kaj ruĝaj kapoj klinitaj, de Valfero, Duko de Akitanio, la princo, pafar-

kisto kaj homĉasisto, de la Legendo de la jarcentoj.

Aragono: lando de kontrastoj, de suproj esplorantaj la loĝejon de la Estajo farinta el nenio la mondon, lando de senfinaj stepoj; de fierecoj kaj delikatecoj, de noblaj arogantejoj kaj de koraj dolĉanimerecoj.

Laŭ RICARDO DEL ARCO  
Kunlaboranto de *Heraldo de Aragón*

Tradukis  
M. C. B.

## Lingvaj aferoj

*Letero sendita al la Lingvo Konvitatanoj, okaze de la protesto de s-no Orengo, rilate al la okazonta nova voĉdonado por novaj radikoj oficialigotaj.*

Ĉar ni konsideras la jenan leteron tre interesplena kaj trafa, kaj tute konsentas pri ĝiaj principoj ni volonte publikigas ĝin.

Bukureŝto, 20 an de Marto 1935.

Str. Dr. Istrate 10.

Kara kolego! Vi certe aprobos la alvokon de s-no Orengo rilate la 25 novajn radikojn oficialigotajn kaj siajn argumentojn. Do nepre rifuzu voĉdoni pli ol jenaj *ses* el la listo sendita de la Akademio la 19 an de Februaro:

*honorario, vizio, arbusto, susuri, angoro kaj baledo ne baleto.*

Nepre rifuzu jenajn *ok malbonajn*: aŭguri, bankiero, iniciativo, iniciatoro, konduktoro, renomo, reteni, vivisekcio.

Rifuzu ankaŭ la dekunu *tute necesajn* aliajn, senutila balasto malfaciliganta la ellernadon de Esperanto: aperturo, aplombo, aŭreolo, koncesio, monotona, strebi, ŝrumpi, gramofono, grego, ingredienco kaj vinkto.

Ne forgesu ke ni volas havi *internacian*, ne *eŭropan* lingvon, ne lingvon por *scienculoj* sed facilan lingvon por la *plimulto* de la homaro.

Ne forgesu ke la *duono* de la *Eŭropanoj* nekleraj ne komprenas latinajn kaj germanajn radikojn, ke la *duono* de la *homaro*, la *Azianoj* ne trovas en ilia lingvo eĉ *unu* el niaj radikoj kaj ke *ĉiu* denove enigita estas *plua* malfacileco.

*Teknikaj* vortoj en la *teknikajn* vortarojn!

Uzu la geniajn eblecojn de la *vortformado* kreitaj de nia Majstro.

Lernu bone la *nunajn* radikojn, *atentu* ilian sencon kaj vi povos *ĉiun* vian penson esprimi.

*Legu kion verkis nia Majstro pere de tiu lingvo kiun vi volas nepre fuŝe fliki.*

*Ĉiu* necesas radikoj estas *baro* kontraŭ nia sukceso.

Mi parolas dek lingvojn, mi estas filologo kaj mi ankaŭ facile povus eltrovi novajn kaj *harfendigajn* nuancojn, sed mi antaŭvidas ke se ni daŭrigos la *fabrikadon pograndon* de novaj radikoj ni bezonos baldaŭ novan lingvon, ne *inter-nacian*, sed —ho ve!—*inter-esperantistan*.

*Forigu la danĝeron kaj rifuzu la oficialigon proponitan.*

Laboru por la *disvastigo* de Esperanto, por ĝia *aplikado* en la ĉiutaga vivo kaj lasu kreski ĝin:

*nature kaj sane: per si mem.*

*Samideane via*

HENRIKO FISCHER L. K.

Priparolu, mi petas, ĉi tiun alvokon en viaj rondo-

## TERURAJO

Sinjoro foje dungis novan serviston, iu el kies ĉefaj tasto helpi sian mastron okaze de vestado kaj malvestado.

Kiam alvenis en la unua nokto la horo enlitiga, la sinjoro vokis sian novan helpiston, por ke li plenumu sian taskon.

La mastro petis al li glason kun akvo kaj post ĝia ricevo, kun granda miro de la servisto, demetis zorge vitran okulon el sia vizaĝo kaj ĝin enakvigis en la glason. Poste li fortiris el sia buŝo artefaritan dentaron, kiun metis ne malpli zorge sur tableton.

Daŭrigante sian malveston la sinjoro ordonis la helpiston tiregi lian maldekstran brakon, kiu laŭŝajne ankaŭ estis artefarita, por ĝin demeti, kaj tuj poste li diris same pri sia dekstra, ligna kruro. La mieno de la novservisto kompreneble fariĝis ĉe tia helpado pli kaj pli miregoplena kaj serioza.

La mastro, kiu malgraŭ siaj kriplajoj ne perdis sian ŝercemon, rimarkinte la servistan animstaton, prezentis al li sian propran kapon kaj per decida voĉo ordonis: Nun fortiru mian kapon.

Ĉe tiuj ĉi vortoj la servisto tiel terurplena eksaltkuregis foren, ke oni neniam plu sciis pri li.

RAMON DE SALAS.

## A V I Z O

En "Librería General", la grava librovendejo de la Portikaro de Promenejo "Independencia", oni vendadas esperanto-librojn; inter ili estas "Sango kaj Sablo", la tiom multe sukcesanta eldono de Aragona Esperanto-Federacio, **la unua romano radukita el la hispana lingvo kaj eldonita en nia hejmlando**. Sciigu ĉion ĉi al viaj konatoj, tial ke ĝi estos ege efika kaj grava propagando por nia parolilo.

## LA DISRADIJAĜO DE LA VERDA STACIO

La 1-an de la nuna majo oni disradiis, kiel ĉiujn unuajn merkredojn de ĉiu monato, de Brno kaj la ceteraj ĉeĥoslovakaj radio-stacioj esperanto-radiaĵon kiun oni aŭdis bonege de nia urbo. Plej bone, Praha'n, je la 21 1/4 horo.

La radiado konsistis el la bela opereto ĉeĥoslovaka "Sur rozoj sternite", duafoje ludata pro insista petado antaŭ la mikrofono de Brno, la Verda Stacio.

Estas ja ĝuo aŭdi per radioricevilo nian karan lingvon bone parolata kaj kantata de fremduloj. Ni invitas do ĉiujn esperantistojn, skribi danke kaj kuraĝige al Radio-journal-Brno—Verda Stacio—Kounicova 44—Brno—Ĉeĥoslovakujo, kie niaj gesamideanoj tiel sindone kaj lerte laboras por la altrangigo kaj propagando je Esperanto.

## SPRITAJOJ

Sro. M., kvankam altvalora verkisto, estis tre malalta pri staturu. Antaŭ nelonge li iris en klubon kaj, kiam li volis al kroĉi sian surtuton kaj ĉapelon ĉe la vestkroĉilaron, li trovis, ke ĝi estas tro alta; tro alta... por li.

Dume alvenis tre alta klubano, kiu, konsciinte pri la malfacila tasko de la verkisto, prenis liajn vestaĵojn kaj al kroĉis ilin senpene.

—Koran dankon—diris Sro. M.—kaj, kiam vi bezonos preni ion de sur la planko, disponu pri mi.

\* \* \*

Du literaturistoj akre diskutis. En iu momento de la disputo unu el ili citis proverbon.

—La saĝuloj elpensas proverbojn kaj la malsaĝuloj ripetas ilin—diris la alia.

—Nu,—tuj rediris la unua—al kiu saĝulo vi aŭdis tion ĉi?

\* \* \*

—Senakva vino estas ja malbona por la sano. En mia hejmo ni trinkas duonon da vino kaj duonon da akvo.

—Ĉu eble? Ĉu vi akvigas vian vinon?

—Ne, tute ne. Mi trinkas la vinon kaj mia edzino, la akvon.

\* \* \*

En konversacia rondo, ne atentante, pri tio ke ĉeestas pastro, gazetisto S. diris:

—Se mi havus filon, kiu estus idioto, mi studigus lin pastran karieron.

Kaj al tio la pastro tre afable respondis:

—Laŭŝajne via patro ne opiniis same, kiel vi.

## ANEKDOTOJ

Aleksandro riproĉis iun marrabiston pri lia profesio: "Mi estas marrabisto, respondis li, ĉar mi nur havas unu ŝipon; se mi havus armeon, mi ja estus konkeranto".

(Abato Bordelon, Kuriozaj diversajoj).

\* \* \*

En la batalo de Brenneville iu malamika soldato prenis je la kondukiloj la ĉevalon de reĝo Ludoviko dirante: "Mi ekkaptis la reĝon". La monarĥo disfalis per glavbato la kuraĝan soldaton kaj aldiris: "Nu, malsaĝulo, ĉu eble vi ne scias, ke en la ŝakludo neniam oni kaptas la reĝon".

\* \* \*

Mynde estis tre malgranda urbeto kun grandaj pordoj. "Oni devus ja fermi ĉi tie la pordojn, diris Diogeno, el timo, ke la urbeto foriru".

(Diogeno el Laerto).